

# Eŭropa Bulteno

Novembro 2016, Numero 165

## KAMPANJO „ZAMENHOF KAJ LABORLINGVOJ EN EU“



La estraro de EEU diskutis pri tio kiel eluzi la unikan jaron en kiu Zamenhof estis oficiale proklamita de UNESCO unu el mondaj personecoj kaj samtempe la plioftiĝintajn interesojn de la ĝenerala publiko pri lingva problemo en EU post la decido pri Briteliro. Kaj ni decidis organizi kaj gvidi kampanjon en EU-landoj sub la titolo „Zamenhof kaj laborlingvoj en Europaj kunvenoj“.

Ni invitas ĉiujn landajn asociojn, membrojn de EEU, dum la sekva jaro organizi laŭeble multajn publikajn

eventojn dediĉitajn al Zamenhof kiel monde grava personeco kaj liaj konceptoj kaj al eŭropa lingva praktiko rilate laborlingvojn en internaciaj kunvenoj.

Nia bulteno aperigos ĉiun kvaronjaron kiom da tiaj aranĝoj okazis en unuopaj landoj kaj fermos la kamanjon la 20-an de decembro 2017 kiam ni proklamos la venkinton. La kampanjo celas eluzi la du faktojn interesajn por neesperantistoj (UNESCO-proklamon kaj Briteliron) por disvastigi laŭeble multe la konscion pri ekzisto de Esperanto kaj ĝiaj potencialoj en lingva situacio en Eŭropa Unio.

Tio signifas ke ĉiu landa asocio devus inviti siajn societojn, klubojn kaj ankaŭ individuojn organizi en siaj urboj aranĝon publikan pri la supra temo. Ni ne kalkulas aranĝojn pure por esperantistoj en kiuj nur Esperanto estas uzata. Ni rekomendas organizi ilin kun iu ŝtata aŭ neregistara organizo kiel kun Eŭropaj kluboj, UNESCO-kluboj, Urbaj Gvidantaroj sed antaŭ ĉio kun ministerioj de eŭropaj aferoj, UNESCO-Komisionoj, reprezentantoj de Eŭropa Komisiono kaj tiel plu. Post ĉiu aranĝo la Landa Asocio raportu mallonge al la sekretario de EEU pri ĝi kaj pri tio aperos informo en la marta, junia, septembra kaj decembra EEU-Bulteno. Fine de la jaro ni nombros la rezultojn kaj proklamos la venkintan Landan Ascion.

La kampanjo ne nur servos al diskonatigo de Esperanto, sed akaŭ por analizi post ĝi diversajn spertojn gravajn por nia estonta laboro: kiel volonte aŭ malvolonte aliaj institucioj kunlaboras kun ni, kiamaniere reagis la publiko, kiom tiuj aranĝoj helpis por ke pligrandiĝu kvanto da E-lernantoj en retaj kursoj, kiujn la kampanjo reklamu ktp.

EEU mem organizos Eŭropan konferencon pri la temo: “Zamenhof kiel antaŭulo de homaj rajtoj” kunlabore kun UNESCO-komisiono de Germanio en germana urbo Freiburg kaj invitis la eŭropan komisionanon Vytenis Andriukaitis kaj plurajn fakulojn.

Ni tre esperas ke ĉiuj landaj asocioj serioze komprenos la ŝancon kiun donas al ni la kampanjo kaj ekagos por havi laŭeble bonajn rezultojn. Se la aranĝoj stimulos publikajn rimedojn debati kaj informi pri la temo kaj Esperanto, ni atingos la celon. Bone planu kaj startu jam en januaro. La Hispana E-Asocio jam komencis plani tiusence, pri kio vi povas vidi la apudan artikolon.

Zlatko Tišljarić, sekretario de EEU

## JARO ZAMENHOF 2017 – PLANOJ EN HISPANIO

Kiel vi ĉiuj jam certe scias, la venontan jaron 2017 estos la datreveno de la morto de Zamenhof. Ni certe devus tion kunmemori (ne celebri!), kaj en la HEF-estraro ni jam komencis cerbumi pri kelkaj aferoj kiujn ni volas plani.

Krom internaj agadoj, mi pensas ke temas pri bona ŝanco iom elkatatombigi nian lingvon, kaj mi jam komencis fari iujn demarŝojn. Ekz. mi rendezvis antaŭ kelkaj tagoj kun respondeculoj de la Pola Instituto pri Kulturo en Madrido kaj de Casa Sefarad (institucio de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj, kiu rilatas al la juda kulturo) pro ties rilato al Zam. Ambaŭ montris tre bonan sintenon pri la kunmemoro, kaj eĉ veran simpatian, ĉefe en la lasta kazo. Mi prezentis kelkajn sugestojn, kaj ili aldonis eĉ pliajn. La Pola Instituto ne konkretigis, ĉar ili devas interkonsenti kun la oficialuloj en Pollando, sed Casa Sefarad eĉ proponis daton por la komenco de la agado!

Do, mi resumas kelkajn el tiuj ideoj lanĉitaj, por diskuto, kaj iom-post-ioma konkretigo. Mi aldonas proponojn por respondeculoj/agantoj, sed sentu vin liberaj aldoni aliajn ideojn kiujn vi mem pretas kunordigi/kunlabori.



Unue: la plej konkreta: Casa Sefarad proponis ke ni prezentu la Jaron Zamenhof en ilia sidejo. Temas pri la tre bela Palacio Cañete en la Calle Mayor de Madrid. Ili jam rezervis por ni la 2-an de februaro 2017 vespere. Ni prelegus pri la figuro de Zamenhof (mi mem pretas), kaj ili mem sugestis ke se ni havas poezion en Esperanto, indus fari deklamadon de poemoj originalaj. Imagu kion mi diris kiam ili tion proponis! Do, POETOJ (ne nur madridanoj!), rezervu tiun daton!

Mi parolis al ili pri ekspozicio, kaj ili diris ke volonte. Ke la sidejo havas lokon por ekspozicio, ĝuste apud la prelegsalono (mi vizitis ambaŭ, kaj jes, tre bonaj). Do: ni havas du ŝancojn: krei specialan ekspozicion pri Zamenhof, por tiu jaro, aŭ uzi (ĉu renovigi?) tiun nunan pri Esperanto. Ili havas vitroŝrankojn por ke la ekspozicio estu pli kompleta, kun libroj, ktp. Casa Sefarad eĉ invitis nin organizi kurson tie de la komenco de la jaro, aŭ utiligi la sidejon por eblaj "konversaciaj rondoj" unu fojon monate (ili faras tion por lernantoj de la hebrea).

Alia ideo estas la organizado de simpozio pri Zamenhof. Fakte, ion tian jam organizos UEA, verŝajne en Pollando fine de aprilo, kaj estas aliaj planoj pri sciencaj simpozioj. Sed ni povas organizi ion kun la apogo de hispaniaj fakuloj. Mia dubo estas ĉu organizi ĝin en Madrido, aŭ ĉu ni profitu la venontan hispanan kongreson. Mi intencas peti subvenciojn, kaj la decido dependos ĉu ni atingus ilin. Mi ankaŭ intencas kontakti kun universitatoj, kaj ankaŭ tio estus decida faktoro.

UNIVERSITATANOJ: volonte mi petas vian kunlaboron jam de nun. Alia afero estas ebla eldonado de libro(j) en la hispana pri Zamenhof kaj/aŭ Esperanto. Mi konsentis kun la institucioj pri tio, ĉar mi pensas ke la ĉefa celo estus atingi eldonadon fare de ekstera eldonejo, ne de ni mem (ĉar tio limigas la disvastigon), eĉ se ni kontribuas. Casa Sefarad sendos al mi kontaktojn kun eldonejoj, sed tiuj el vi kun profesiaj rilatoj, bv. agi. Unua kandidato nun estas la traduko en la hispanan de "La Zamenhof-strato", ĉar ĝia traduko estas jam preskaŭ finita kaj ĝi aperis en multaj lingvoj. Sed aliaj sugestoj aperis, kaj certe mi pretas aldoni aliajn ideojn.

Toño del Barrio

## LABORPLANO DE EEU POR LA JARO 2017



Dum la kunveno de la estraro de EEU okazinta la 19-an de novembro 2016 en Modra Harminia (Slovakio) de EEU estis akceptita la orientiga Laborplano de EEU por la jaro 2017,

kiun ni prezentas ĉi-sube. La membraro rajtas kontribui per rimarkoj kaj proponoj. Faru tion ĝis la fino de decembro konsiderante la realajn financajn kaj personarajn kapacitojn de EEU.

1. Ellaboro de 2-5 novaj projektoj baze de konkursoj de Europa Komisiono kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Citizenship kaj Erasmus+.

2. Organizado de eŭropa konferenco pri la temo „Zamenhof kiel antaŭulo de homaj rajtoj“ kune kun LKK de Germana E-Kongreso en Freiburg komence de junio 2017

3. Organizo de la kunsidoj de la Asembleo de EEU dum la Germana E-kongreso en Freiburg, dum kiuj estos elektita nova estraro de EEU.

4. Organizado de delegado de novaj membroj en la Asembleon de EEU far landaj asocioj.

5. Kunlaboro kun la membro de Eŭropa Komisiono V. Andriukaitis baze de interkonsento kun li dum la Nitra Eŭropa Konferenco pri strategioj kiel interesigi superajn EU-organojn pri lingvaj potencialoj de Esperanto, aparte en la situacio de Briteliro.

6. Stimuladi en laŭeble multaj EU-landoj ke ili proponu al landa ŝtata aŭ UNESCO-instanco akcepton de decido pri Esperanta kulturagado en tiu lando kiel nacia kulturheredaĵo.

7 Realigo de aprobita projekto kadre de Citizenship-programo de la Eŭropa Komisiono „Rakontoj celantaj memori“. La projekton kunordigas EEU kaj kunpartoprenas tri aliaj partneroj (E@I, Asocio por eŭropa konscio Maribor kaj Kultur- und Bildungsprojekte el Berlino).

8. Pluaktivi en Platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I.

9. Eldoni libron paperforman pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 28 artikoloj pri la movadoj en 28 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2013 kaj kreis elektronikan formon de la libro troviĝanta en nia paĝaro.

10. Klopodi daŭrigi partoprenon de EEU en Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) komence de septembro 2017



11. Partopreno de EEU-reprezentantoj en laŭeble multaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.

12. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en ĉiuj konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU al kiuj ili estos invitataj.

13. Kunlaboro kun la grupo

de pola parlamento pri Esperanto kaj kun slovakaj instancoj pri dissenado de la konkludoj de la Nitra prilingva konferenco.

14 Plua klopodo serĉi vojon organizi kadre de Euroscola en Strasburgo apartan sesion por gimnazioj kun E-kursoj.

15. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj kaj lokaj societoj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro): dediĉitaj al 100-jariĝo de la morto de Zamenhof, kiu estas proklamita unu el 100 mondaj granduloj por la jaro 2017 far UNESCO. Tio estu publikaj prelegoj, ekspozicioj, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj pri Zamenhof kaj lingva problemoj...

16. Kompletigi la retan kurson de Esperanto per komuna baza lernilo por komencantoj en ĉiuj ligvoj de EU baze de la eltrovita fundamenta morfemlisto de la plej oftaj morfemoj en parole kaj skribe uzata Esperanto (esploroj de Z. Tišljár kaj R. Gerard) en la retejo [www.learn.esperanto.com](http://www.learn.esperanto.com). Ĝin kreis germana esperantisto Georg Jaehnig kaj ĝis nun estas finfaritaj kursoj en deko da eŭropaj lingvoj. (plus kelkaj neeŭropaj)

17. Disvastigo de konkludoj de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por Antaŭenigo de Multlingveco, per prelegoj kaj rondaj tabloj.

18. EEU-kunlaboro kun diversaj mondaj kaj eŭropaj organizaĵoj kiel UEA, TEJO, SAT, EDE, ILEI, AEK, AVE...

19. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro kaj paĝaro de Remush (<http://remush.be/bulteno/index.html>)).

20. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU: [www.europeo.eu](http://www.europeo.eu)

21. Stimuli kunlaboron kun organizantoj de modernaj kursoj kiel duolingo kaj aranĝoj por novlernantoj en tiu kurso.

## KAEST 2016

De la 17-a ĝis la 20-a de novembro jam kvaran fojon sub gvidado de E@I en la urbo Modra (Slovakio) okazis Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), en kiu partoprenis pli ol 60 homoj el 15 landoj. La celo de tiu ĉi konferenco estas montri, ke Esperanto taŭgas ne nur por simpla babilado kaj komunikado inter homoj, ne nur por komponi belajn kantojn kaj verki interesajn rakontojn, sed ankaŭ por vera scienco. Eĉ la aranĝa devizo diras “Venu ankaŭ vi ĝui sciencan Esperanto!” Efektive tio estas vero! La pasinta KAEST sukcese plenumis sian taskon kaj montris, ke serioza scienco ne troviĝas malproksime de esperantistoj kaj Esperantujo. La ĉefa aranĝa temo estis “Avantaĝoj kaj obstakloj de moderna komunikado”. Dum tiu ĉi konferenco okazis pli ol 50 prelegoj, seminarioj (inkluzive AMO-seminario sub la egido de UEA en la persono de vicprezidanto de UEA Stefan MacGill), diskutforumoj, publikaj lecionoj ktp. Multaj prelegoj estis dediĉitaj al moderna komunikado (per Esperanto kaj ne nur per ĝi) kaj ĝiaj problemoj, kiuj nun staras antaŭ moderna informa homaro.



Signifaj estis la prelegoj de Chuck Smith. La unua estis pri la aplikaĵo Amikumu: revolucia apo por trovi apudajn lingvopartnerojn, kiu aperos en 2017. Esperantistoj ĉiam revis pri la eblo facile kaj rapide trovi aliajn esperantistojn apude. Tial en 1893, oni ekuzis la verdan stelon por esti videbla al aliaj. Tamen, nun en 2016 ni havas multe pli bonan teknologion por ebligi tion multe pli rapide kaj efike: saĝtelefonon. La dua prelego de Smith estis dediĉita al alia aplikaĵo, Duolingo, per kiu jam ol pli 600 mil homoj eklernis Esperanton tutmonde.

Grava kaj interesa parto de prelegoj rakontis pri influo de modernaj teknologioj al moderna socio (Peter Baláž), pri sekureco en interreto (Chris Kerr, Katarína Nosková, Julia Noe, Eva Poláková), dum kiuj aŭskultantoj povis ekscii pri privateco kaj malprivateco en interreto, pri influo al homa cerbo de uzado de saĝtelefonoj kaj interreto, pri reta ĉikano, seks-tekstado kaj reta pornografio, kaj pri aliaj gravaj malavantaĝoj kaj danĝeroj de modernaj komunikiloj kaj teknologioj.



Sed temis ne nur pri moderna komunikado. Multaj prelegoj rakontis pri “malnovaj”: lingvoj kaj interligvistiko. Ekzemple, la lingvisto Radovan Garabík prelegis pri analizo de dinamika evoluo de la slovaka lingvo, dum kiu li informis pri la metodoj de analizo kaj kelkaj interesaj trovaĵoj kaj tendencoj de la nuntempa slovaka lingvo; la lingvisto Stanislav Košecký rakontis pri la loko de

Esperanto en la kategorio “homa lingvo”; prof. Slavomír Ondrejovič prezentis lingvoevoluaĵajn tendencojn nuntempe, precipe de la slovaka; prof. Pavol Žigo parolis pri kontinueco de interligva komunikado el retrospektiva vidpunkto; la profesia tradukisto Pavol Petrik montris, kio estas la arto de tradukado. Signifa estis prelego de la eminenta esperantisto Zlatko Tišljár pri eŭropaj lingvaj perspektivoj. Z. Tišljár diris, ke post Briteliro la eŭropa lingva demando ĉiam pli akre prezentiĝas en diversaj publikaj lokoj kaj jam multaj neesperantistoj komencas paroli pri Esperanto kiel alternativo. Ankaŭ li rakontis pri lingvaj perspektivoj en la sekvaj jaroj en EU.

Multaj prelegoj ankaŭ prezentis Esperanto-movadon kaj kulturon, filatelon kaj historion, meditado kaj veganismon, galaksian evoluon kaj bicikladon ktp. Ĉiu povis trovi tion, kio interesas lin. Preskaŭ ĉiam post la prelegoj estis viglaj diskutoj (kaj eĉ kelkfoje disputoj) en kiuj aktive partoprenis aŭskultantoj. Rimarkinde, ke ĉi-foje ankaŭ estis kelkaj publikaj lecionoj, kie oni povis ricevi novajn sciojn kaj kiel praktike utiligi ilin, ekz. pri Vikipedio, pri diversaj Guglo-programoj, grafikaj programoj, meditado.

Riĉaj estis vesperoj, kiam partoprenantoj povis paroli kaj daŭrigi komencitajn kaj novajn diskutojn, ludi kaj vingustumi. Ankaŭ ĉiuvespere estis muzikumado kaj instruado de Esperanto-kantoj, kie oni lernis (mal)novajn E-kantojn.

Do ni povas diri, ke la pasinta KAEST estis sukcesa, utila kaj riĉa, ne nur danke al abunda kaj intensa programo, sed ankaŭ danke al varma amika kaj (memkompreneble) scienca etoso. Ni atendas vin en 2018!

Ilja Gnusarev (nuntempa [E@I-volontulo](mailto:E@I-volontulo)), Rusio

## PROGRESEGO DE RETAJ E-KURSOJ

### Duolingo



Tiu enorma E-kursejo kreskegas en la angla versio neimageble kompare kun io ajn konata en E-historio. Nun, unu jaron kaj 4 monatojn post ĝia starto aliĝis al la kurso pli ol 600.000 lernantoj. Ĉiutage aliĝas ĉirkaŭ 1300 novaj lernantoj kaj finas la kompletan kurson pli ol 30. Laŭ tiu dinamiko en somero 2017 aliĝos la miliona lernanto!! La lernantoj mem kreas diversajn retajn programojn por reciproka kontaktado kaj plulernado. Okazas granda interesa socia dinamiko. Antaŭ du monatoj startis la hispana versio en kiu nun jam lernas pli ol 7000 hispanparolantoj. Tio, kompare kun la angla estas iom malpli bona, sed kompare kun io ajn

alia en la hispana areo, denove neimageble granda.

### Learn.esperanto.com



Nova kursejo sub supra retadreso, kreita de Georg Jähnig celas laŭeble rapidan enkondukan praktikan kurson, kiu ebligas la plej eble rapidan lernadon de tuj uzebla Esperanto. Ĝi uzas la Zagrebmetodan enhavon, bazitan je 500 plej oftaj morfemoj uzataj en parolata lingvo. Ĝia kroma kvalito estas ke ĝi daŭre aperas en novaj kaj novaj lingvoj kaj estas ŝanco ke ĝis la sekva somero jam per ĝi povos lerni komencantoj en trideko da lingvoj.

Pro la identaj materialoj (leciontekstoj, gramatikeroj, vortaro kaj ekzercoj) ĝi ebligas samtempan lernadon

de pluraj personoj en diversaj landoj kaj reciprokajn kontaktadon, ĉar ili regas la saman

lingvonivelon. Diference de duolingo ĝi klarigas al la kursanoj en ilia nacia lingvo la gramatikon.

Jen kelkaj indikoj pri ĝi prezentitaj de Georg Jähnig:

Ni nun havas proksimume 4600 vizitantojn monate

La plej uzataj lingvoj en la lasta monato laŭvice:

32% portugala

21% angla

14% hispana

5% germana

4% ĉina

Ni nun havas finajn tradukojn en 14 lingvoj – en aprilo ni komencis kun 2. Plue, preskaŭ pretaj ŝajnas al mi 5 pliaj: kroata, indonezia, pola, rusa kaj sveda.

Zlatko Tišljar

## TRE SUKCESA INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO 2016



De la 16-a ĝis la 22-a de junio en la belega kroata urbo Osijek okazis la Internacia Esperanto-Konferenco 2016 de OSIEK. Ĝia temo estis “Landoj ĉe vojkruciĝo”. Partoprenis geesperantistoj el Francio, Hungario, Germanio, Kroatio, Rumanio kaj Bulgario.

La partoprenantoj alvenis la 16-an de julio 2016 kaj estis loĝigitaj en la eleganta hotelo “Millennium”. La saman vesperon la organizantino de la konferenco, Viŝnja Brankoviĉ,

bonvenigis la gastojn per bongusta kroata vespermanĝo en la restoracio de la hotelo.

La solena inaŭguro de la konferenco estis la 17-an de julio. Horst Vogt – vicprezidanto de OSIEK, kore salutis la partoprenantojn nome de la prezidantino Mantha Christou, kiu tre bedaŭris pro malsano ne esti inter la konferencanoj. Viŝnja Brankoviĉ same bonvenigis la venintojn kaj deziris sukcesan konferencan laboron en la kroata urbo Osijek. Anne Jausions, vicprezidantino, kaj Horst Vogt prezentis la kandidatverkojn por la OSIEK-premio 2016. Anne Jausions tre detale kaj tre kompetente parolis pri “Ordeno de verda plumo” de Josip Pleadin, “La libro de la mirindaĵoj” de Marko Polo, tradukita en Esperanton de Daniel Moirand, “La Zamenhof-strato” de Roman Dobrzynski, “La historio de la Esperanta literaturo” de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer kaj “Libazar’ kaj Tero – kvarmana sonato dutonala” de Julia Sigmond kaj Sen Rodin.



Posttagmeze la partoprenantoj vizitis la urbon kaj la ĉiĉerono, flue tradukita Esperanten de Viŝnja Brankoviĉ, bilde kaj alloge rakontis la multjarcentan historion de Osijek. Li menciis, ke en la urbo, kiu situas laŭlonge de la dekstra bordo de rivero Drava, loĝas ĉirkaŭ 110.000 loĝantoj. La kvartalo Tvrdja (Fortikejo), de kie komenciĝis la promenado, kaj la trarigardo ravis la partoprenantojn per la barokaj konstruaĵoj kaj la riĉa historio. De Tvrdja oni iris al Gornji grad (La supra urbo), kie ni trarigardis diversajn urbajn monumentojn kaj la grandan gotikan preĝejon, simbolo de la urbo. La konferencanojn impresis la multaj parkoj, ĝardenoj kaj Brankoviĉ diris, ke ofte oni nomas Osijek “urbo en la parkoj”.

La 18-an de julio komenciĝis la prelegoj. Viŝnja Brankoviĉ prelegis pri Osijek kaj Slavonio antaŭ 1991. Ŝi detale rakontis pri la urbo, kiu estis grava ekonomia kaj industria centro antaŭ 1991. En ĝi funkciis multaj fabrikoj kaj entreprenoj: fabriko pri sukeraĵoj, tekstila fabriko, fabriko por sapo kaj lavpulvoroj, uzino pri agrikulturaj iloj kaj fama bierfabriko, kiu ekestis jam en 1664 kaj estis oficiale registrita en 1697. Bedaŭrinde, kiel en aliaj orienteŭropaj landoj, pluraj fabrikoj en Osijek jam ne funkcias pro la krizo, kiu komenciĝis post la milito en 1991 kaj kiu kaŭzis la malprogreson de la urbo.

Post la prelego de Viŝnja Brankoviĉ la anoj en la konferenco vizitis la unikan muzeon “Gloria Maris” en la malnova urbocentro Tvrdja. La muzeo vekis la miron kaj la admiron de ĉiuj. Tie oni vidis konkojn, koralojn, mumigitajn fiŝojn, marajn perlojn, kiujn ne eblas vidi en alia muzeo en la mondo. La fondinto-posedanto de la muzeo longe kaj detale rakontis pri la maraj estaĵoj en la muzeo, kiujn li mem kolektis en diversaj maroj kaj oceanoj.



Posttagmeze la konata kroata esperantisto Zlatko Tiŝljar prelegis pri la situacio en la nuna Eŭropo. La titolo de lia prelego: “Kiel solvi eŭropan krizon?” estis interesa, ĉar Zlatko Tiŝljar bonege konas la problemojn de nuna Eŭropo: la krizon kun la enmigrintoj, la gravajn ekonomiajn problemojn, la diversajn mondperceptojn. Estas urĝe bezonataj reformoj kaj la plej grava tasko laŭ Tiŝljar estas komenciĝo de la eduko pri la eŭropa identeco. Por la solvo de la nuna krizo la civitanoj el ĉiuj eŭropaj landoj devas strebi al unueco en la diverseco. Tre grava por Eŭropo estas komuna ideologio, kiu nun mankas kaj nur dank’ al tiu ĉi ideologio Eŭropo povus esperi pli bonan estontecon.

Posttagmeze estis belega ekskurso kaj vizito de la naturparko Kopački rit, riĉa je flaŭro kaj faŭno, kiu situas en inunda ebenaĵo de du grandaj riveroj Danubo kaj Drava. En ĝi nestas multaj birdoj: blankvostaj agloj, kormoranoj, ardeoj, hirundaj ŝternoj, malgrandaj ŝternoj, grenokanbirdoj kaj aliaj.

La 19-an de julio prelegis Maria Butan. La titolo de ŝia prelego estis “Rumanaj landoj ĉe historiaj vojkruĉiĝoj”. Tre kompetente kaj detale Maria Butan priskribis la rumanan historion. Ŝia riĉenhava prelego estis bonege ilustrita per koloraj mapoj, montritaj sur ekrano de komputilo. La prelegantino rakontis pri diversaj rumanaj reĝoj kaj pri la gravaj historiaj eventoj dum ilia regado. Ŝi analizis la historiajn epokojn kaj faris konkludojn pri la evoluo de la lando. Por la ĉeestantoj la prelego estis ege interesa, ĉar ili eksciis gravajn faktojn pri la rumana historio, kiujn ne eblas ofte tralegi en sciencaj kaj aliaj verkoj alilingve.

Georgi Mihalkov prelegis pri la bulgara Esperanta poezio. En la prelego li emfazis la tri gravajn periodojn de la bulgara Esperanta poezio: antaŭ la Unua Mondmilito, inter la du mondmilitoj kaj post la Dua Mondmilito. La preleganto analizis la poezian verkaron de la plej elstaraj bulgaraj Esperanto-poetoj: Hristo Rjahovski, Petro Jordanov, Dimitro Zlatarski, Asen Grigorov, Violin Oljanov, Todor Ŝoŝev, Venelin Mitev, Nikola Pilev kaj aliaj. Mihalkov ilustris sian prelegon per citaĵoj el diversaj poemoj kaj tiel montris ne nur evoluon de la bulgara Esperanta poezio, sed ĝian gravan rolon en la monda Esperanto-poezio. Posttagmeze la anoj en la konferenco vizitis la termalbanejon Bizovacke Toplice, kie ili naĝis en la baseno, ĝuis la mineralan akvon kaj la belegan someran veteron.

Merkrede, la 20-an de julio estis tuttaga ekskurso. La partoprenantoj en la konferenco vizitis la urbon Vukovar kaj la muzeon de prakulturo de Vucedol. Sincere dirite mi unuan fojon en mia vivo eniris en tian grandan kaj unikan muzeon. Ĉiuj eksponaĵoj tie estis zorge ordigitaj kaj modele montritaj en vitrinoj. Sur ekranoj estis fotoj kaj filmoj pri la vivo, kutimoj kaj la vivmanieroj de la praloĝantoj de Vucedol. La muzeo konsistas el 19 grandaj salonoj. La juna kaj ĉarma ĉiĉeronino Marija Tadiĉ inspire kaj alloge rakontis pri la arkeologiaj elfosaĵoj, faritaj dum jaroj de la plej elstaraj kroataj arkeologoj kaj pri iliaj unikaj trovaĵoj. La arkeologoj pacience, sisteme kaj science sukcesis restarigi la vivon de la praloĝantoj tie. Ni, la spektantoj, kvazaŭ revenis en la pasintajn jarcentojn kaj eksentis la atmosferon de la vivo de la tiamaj homoj.

La 22-an de julio estis la prelego de la blinda Nedeljka Lozajiĉ, sed pro oficvojaĝo al Usono ŝi ne povis veni en Osijek kaj rete sendis sian prelegon, kies titolo estis: “Literaturo – vojaĝo sen limoj”. La prelegon tralegis sinjorino Viŝnja Brankoviĉ. En la prelego Nedeljka Lozajiĉ emfazis la rolon de la literaturo por la homaro kaj aparte ankaŭ por blinduloj. Oni ne eblas imagi la mondon sen la ekzisto de la literaturo. Ĝi enhavas la homan vivon, la homan kulturon, la tradiciojn, la religiojn, la historion, la jarcentajn spertojn kaj la evoluon de la homaro.



Post la prelego de Nedeljka Lozajiĉ, sekvis la prelego de Spomenka Ŝtimec, kiu prelegis pri la fama Esperanta poeto Vasilij Eroŝenko. La titolo de la prelego estis “Kroataj fruktoj de la ĉina restado de la blinda esperantisto Vasilij Eroŝenko”. La prelego estis tre detala, tre riĉenhava kaj emocia. Spomenka Ŝtimec rakontis la vivon kaj la travivaĵojn de Eroŝenko en Japanio kaj Ĉinio. La vivo de tiu ĉi blinda, sed fervora kaj arda esperantisto, estis pli interesa ol romano. Per sia granda amo al Esperanto li sukcesis venki ne nur ĉiujn malfacilaĵojn, veturante de lando al lando, sed kreis en Esperanto rimarkindajn verkojn, kiujn oni tradukis en japanan kaj en ĉinan lingvojn. Dank’ al Eroŝenko la ĉinoj havis eblecon konatiĝi kun verkoj de kroata kaj bulgara literaturo, ĉar unuaj tradukoj en ĉinan lingvon estis faritaj de la Esperantaj tradukoj. Esperanto estis lingvoponto.

Post la fino de la konferenco, la 22-an de Julio, okazis la Ĝenerala Asembleo de OSIEK kun voĉdonado por OSIEK-premio, la loko kaj la temo de estonta IEK. Tiu ĉi parto de la konferenco iĝis tre grava. La tagordo estis: Raporto pri 2015, Raporto de la kasisto, Aprobo de la raportoj, Elekto de nova komitato, Adapteto de la Statuto, IEK-2017, Voĉdonado pri la premio kaj diversaĵoj. Horst Vogt raportis pri la agado dum 2015 kaj pri la konferenco, kiu okazis en Lillo dum la 100-a Universala Kongreso. Eric Laubacher raportis pri la financa stato de la organizaĵo kaj dokumentite montris la enspezojn kaj elspezojn. Li klarigis, ke la financa

stato estas tikla, ĉar elspezoj superas la enspezojn, sed danke al novaj ideoj de la nova komitato restas ebleco daŭrigi la agadon de OSIEK. La du raportoj estis unuanime aprobitaj kaj akceptitaj de la anoj de Asembleo. Sekvis la elekto de nova komitato, ĉar la oficperiodo de la ĝisnunaj komitatanoj finiĝis.

Vogt dankis al la ĝisnunaj komitatanoj por la laboro de la lastaj kvar jaroj. Apartan dankon li esprimis al Mantha Christou, Anne Jausions kaj Eric Laubacher por la multjara sindediĉa laboro por la societo.

En la nova komitato estas: Pål Kozsuch – prezidanto, Horst Vogt – vicprezidanto, Eric Laubacher – kasisto, Eugeno de Zilah – kulturaj rilatoj kaj OSIEK-premio, d-ro Klaus Perko – administracio de la sidejo, Françoise Laubacher kaj Paola de Zilah – anoj. Sekvis sekreta voĉdonado pri OSIEK-premio kaj ĝin ricevis la libro “Historio de la Esperanta literaturo” de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Per sekreta voĉdonado estis elektita la temo de la venontjara konferenco: “Esperanta literaturo de la XXI jarcento”. La konferenco mem laŭ akceptita propono de Pål Kozsuch laŭeble okazu en Nitra, Slovakio, rando de la tiea Somera Esperanto-Studado (SES), pro kio li jam kontaktis Petro Baláž, la organizanton de SES.

Viŝnja Brankoviĉ per emociaj vortoj adiaŭis la anojn de OSIEK kaj dankis al ili pri la partopreno en la IEK-2016. La konferenco en urbo Osijek, Kroatio, restos neforgesebla. Viŝnja bonege kaj modele organizis ĝin. La kondiĉoj en la hotelo estis tre bonaj, la tuta programo tre varia kaj riĉa. Ĉiuj partoprenantoj pasigis agrablajn tagojn en tiu ĉi kroata urbo kaj ĝuis valorajn prelegojn, konversaciis kun amikoj, konatiĝis kun novaj personoj kaj ankoraŭfoje konstatis la unikecon de Esperanta kulturo, la amikecon kaj la sukcesan kunlaboron.

Nun, post la fino de konferenco, mi emocie denove kaj denove travivas ĉiujn agrablajn momentojn, kiuj estis en Osijek, la longajn kaj amikajn konversaciojn kun Anne kaj Claude Jausions, Eric kaj Françoise Laubacher, kun Maria Butan, Spomenka Ŝtimec, Horst Vogt kaj la aliaj.

Julian Modest

## SARAJEVO INVITAS UK-on



Sarajevo, multkultura metropolo, fondiĝis en 1462. Ĝi estas ĉefa kaj la plej granda urbo de la ŝtato Bosnio kaj Hercegovino. Ĝi spertis du mondmilitojn, eĉ estis startigilo de la unua mondmilito.

La Esperanta movado en la urbo aktivas ekde 1910. Ĝi kulminis inter 1970 kaj 1991. En la jaroj 1994-1995 la ŝtata Radio-Bosnio kaj Hercegovino elsendis programon “Esperanto el Sarajevo”. Elektitaj artikoloj el la

elsendoj aperis en la libro “Spite al ĉio - Bosnio”.

Kiel urbo-kandidato por la 103-a UK Sarajevo bonvenigas esperantistojn kaj ĝia ĉefurbestro prof. d-ro Ivo Komšić (vidu la foton) faris varman inviton. Li diris:

“Mi kore invitas Universalan Esperanto-Asocion kaj esperantistojn de la mondo ariĝi en 2018 en Sarajevo, la urbo kiu per la gastamo, simpatieco kaj subteno de siaj civitanoj faros ke via laboro kaj la restado estu agrablaj kaj memorindaj.”

Laŭ vikipedio Sarajevo havas ĝemelan rilaton kun Barcelono en Hispanio, Zagrebo kaj Dubrovnik en Kroatio, Ljubljana en Slovenio, Salt Lake City en Usono, Cairo en Egiptio, Lillehammer en Norvegio, Skopje en Makedonio, Konya en Turkio kaj Rasht en Irano. Krome ĝi havas 30 fratajn urbojn en 20 landoj.

Fetah Zvirac

## LA 14-a VERKISTA RENKONTIĜO EN NORDA KROATIO



La 16-an de septembro 2016 okazis en eta vilaĝo kelkdek kilometrojn norde de Zagrebo, Hrašćina, la 14-a renkontiĝo de esperatlingvaj verkistoj kaj tradukistoj, kiun organizis kune Kroatia E-Ligo kaj E-societo Trixini. La ĉefmotoro kaj surloka organizanto estis kiel ĉiam ĝis nun Spomenka Ŝtimec.

La ĉi-jara renkontiĝo antaŭvidis la ĉefgaston Paul Gubbins el Britio, sed tre neantaŭvidite li mortis nur unu monaton pli frue kaj la

anstataŭa gasto iĝis György Nanovszky el Budapeŝto, fama esperantisto kaj tutviva diplomato, longjara ambasadoro de Hungario en Rusio. Li prezentis sian aŭtobiografion Nano, tre nekutiman, spritan kaj instruan verkon. La libro aperis en formo de inervjuo kiun faris Istvan Nemere. Okazis post la prezento de Spomenka Ŝtimec intervjuo kun la aŭtoro kaj pro tro da interesaj materialoj kaj manko da tempo Kroatia E-Ligo decidis inviti la aŭtoron reveni al Kroatio okaze de Zamenhoftago por daŭrigi rakonti pri la libro kaj sia tre interesa vivo.

Poste Slavko Goldstein, grava kroatia historiisto prezentis sian patron, esperantiston lige al aperigo de la libro „1941 –jaro kiu revenas“ (en la kroata). La sekva programero estis prezento de nova libro: „Pri kio mi fieras“ en kiu prezentas rakontojn pri la temo 63 aŭtorinoj inter kiuj 5 esperantistinoj. Partoprenis 4 el ili inter kiuj la redaktorino Olga Ŝtajdŭar Pađen. Kaj la fina ero estis prezento de la unua kroatingva libro de Spomenka Ŝtimec „Dom u srednjoj Eŭropi“ (Hejmo en Mezeŭropo). La libron prezentis ties redaktoro Božidar Brezinščak Bagola.



Partoprenis kiel kutime kvindeko da partoprenantoj el 5 landoj. Mi esperas ke en la 15-a renkontiĝo en la Zamenhofa jaro (meze de septembro 2017) partoprenu pli da homoj el pli da landoj.

Zlatko Tišljarić

## POEMOJ DE HISPANAJ E-ISTOJ EN GRAVA HISPANLINGVA POEZIA REVUO

*Caja de resistencia* estas prestiĝa hispana ret-revuo pri nuntempa soci-kritika poezio, kolektive kaj kunside farata kaj administrata, aperanta du fojojn jare (maje kaj oktobre). La poemoj en ĝi publikigatas nur trapasinte rigoran elektoprocezon fare de poezia juĝkolektivo. Ni e-istoj povas fieri, ke por la unua numero, lanĉita pasintmaje, la poemon nomatan *2010*, de nia lirikisto Suso Moinhos, tiu kolektivo juĝis aperiginda en *Caja de resistencia*. Sur jena paĝo <http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero1/moinhos/> legeblas du versioj (la originala esperanta kaj ties hispanigo far la aŭtoro mem) de la poemo *2010*, kune kun foto de Suso Moinhos kaj lia biografio, kie oni informas, ĉefe, pri lia laboro kiel E-verkisto.

Ĝus aperis la oktobra (dua) numero de la revuo <http://cajaderesistencia.cc/category/caja-de-imprensa/caja1-numero2/>. Kaj ankaŭ ĉi-okaze la juĝkolektivo rigardis aperiginda poemon de e-isto. Ja tio aparte min honoras, ĉar... nu... tiu esperantisto estas mi mem. Sed min ĝojigas super ĉio la bona bildo kaj la respekto, kiujn pere de niaj elektitaj poemoj la E-poezio ricevis en ĉi grava medio ekstera al Esperantujo. Grava, ĉar oni en ĝi elmontras plej interesajn,

diferencajn kaj altflugajn poetikojn nuntempe praktikatajn sur la soci-kritika tereno ĉefe en Hispanio, sed ankaŭ en plej diversaj landoj (nehispanlingvaj poemoj aperas dulingve, nome en la lingvoj originala kaj hispana). Mia poemo *Apostolo de la Ideo – Apóstol de la Idea* (en mia hispanigo) legeblas sur la paĝo <http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero2/fernandez/>, sur kiu aperas ankaŭ miaj foto kaj biografio abunda je literatura esperantumado.



Sed mian feliĉon levas al la sepa ĉielo du mirindaj cirkonstancoj. Jen la unua: ĉi-numere, fakte, kunlaboras du esperantistoj. Ĉi-okaze, nia Suso Moinhos estis petata realigi la hispanigon de du rumanaj poemoj, unu de Răzvan Țupa <http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero2/tupa/> kaj la alian de Felix Nicolau <http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero2/nicolau/> Jen la dua superfeliĉiga cirkonstanco: la oficiala prezento de *Caja de resistencia* okazos la 15an de novembro en la konata madrida librovendejo La

Central (Calle del Postigo de San Martín, 8, apud Plaza de Callao), je la 19a horo. Al ĉi prezento estis invititaj por deklamo de siaj poemoj kelkaj gepoetoj, kies kontribuoj aperis, ĉu en unu, ĉu en la alia el la du numeroj ĝis nun publikigitaj. Nu, inter la invititoj troviĝas la du E-poetoj ĝis nun partoprenintaj en la revuo: Suso Moinhos kaj mi mem. Tial, ke ne eblos al li veni Madriden, Suso petis min voĉlegi lian poemon. Plej volonte kaj plezure mi deklamos en Esperanto kaj en la hispana tiel lian poemon kiel la mian.

Esperantistoj de Madrido kaj de pli-malpli proksimaj urboj kaj vilaĝoj estas petataj ĉeesti tiun poezian eventon, kie Esperanto kaj du el niaj poetoj rolos same digne kaj respektinde kiel aliaj lingvoj kaj, respektive, alilingvaj bardoj.

Kaj, ĝenerale, ĉiuj esperantistoj estas fervore invititaj legi kaj ĝui la revuon *Caja de Resistencia*. Super la supra dekstra angulo de la foto de ĉiu poet(in)o fronte al l(ŝ)ia poemo videblas vinjeto de koro. Alklakante ĝin, oni montras sian ŝaton al la responda poemo. Do, se vi tion faros pri la poemoj de Suso kaj de mi, vi pravigos la elekton faritan de la juĝkolektivo kaj la respekton montratan de ĉi medio al la E-poezio.

Miguel Fernández

## ESPERANTO EN EŬROPA MUZIKFESTIVALO

En majo 2016 dum la Eŭropa Muzikfestivalo por la Junularo en Neerpelt, Belgio estis kantata »Najtingalo« de Kristian Van Ingelem en Esperanto.

Herman Deceuninck

## LINGVA PROBLEMO EN OLIMPIKOJ

La olimpiko estas unu el la plej grandaj internaciaj eventoj. Dum tiu ĉi evento kunvenas en gastiganta lando sportistoj el diversaj nacioj kun diversaj lingvoj por fari sanan konkuradon. Laŭ filozofio de la olimpiko nur venki dum la vivo ne estas ĉefa afero, sed penadi. Venki konkursanton ne estas ĉefa afero, sed partopreni kaj bone batali. Efektive la sporto estas ilo, kiu servas pacon, amikecon kaj ŝanĝon de la mondo.

Do, la celo de la olimpiko estas kreo de pli paca kaj pli bona mondo. Tio sendube estas altega celo. Sed ĉu nur havi bonajn ideojn sufiĉas? Kompreneble en la homaro dum la historio, ne mankis/as bonaj ideoj kaj pensoj. Jen estas demando: ĉu la ideoj kaj la pensoj per si mem efektiĝas/os? Nu, estas jam multaj jaroj, ke ni estas atestantoj de la kunvenoj de atletoj nomata la olimpiko. Dum tiuj ĉi kunvenoj kiom da profundaj amikecoj inter la sportistoj estiĝis? Kiom ili proksimiĝis unuj al la aliaj? Ili kolektiĝas, konkuras, sed io grava mankas. Dum la olimpiaj ludoj la sportistoj preterpasas unu la alian kaj iliaj solaj vortoj povas esti "saluton" aŭ "kiel vi fartas", angle aŭ alilingve, ĉar ili timas kaj eĉ hontas halti kaj interparoli pri diversaj aferoj. Supozeble vi ankaŭ samopinias kun la skribanto de la linioj, ke la naciaj lingvoj tute ne taŭgas por la intenaciaj rilatoj.

La celo de Zamenhofo ankaŭ estis estigo de pli bona kaj pli paca mondo surbaze de komuna kaj facila lingvo. En unu el la lastaj tagoj de olimpiko en Rio-de-Ĵanejro 2016, Brazilo, la perskanalo de BBC hazarde montris intervjuon kun iu japana s-ino, en kiu ŝi indikis interesan kaj gravan punkton. Ŝi - kiu verŝajne estis unu el la sportaj respondeculinoj en sia lando - esprimis, ke ŝia lando por la olimpiko 2020 bezonos almenaŭ 75.000-personan armeon da tradukistoj kaj tiu ĉi afero estas grandega defio por Japanio. Vi mem kalkulu, kiom kostos tiu ĉi armeo de tradukistoj!



Kian kostogen trudos la registaro al japanoj!

La deklaro de la respondeculino, venigis tiun ĉi penson en mian kapon: kial ni ne lanĉus kampanjon por uzi kaj apliki Esperanton en la olimpiko 2020? Konsideru ke Japanio estas unu el pioniraj landoj pri E-o kaj antaŭ nelonge havis sian centan nacikongreson. Tial ni respektu petas japanan E-asocion kontakti respondeculojn en la internacia komitato de la olimpiko, por ke E-o iĝu unu el la komunikaj aŭ eĉ oficialaj lingvoj de tiu ĉi internacia evento. Ili eĉ povus tuj starigi retan paĝaron, en kiu oni povos subskribi kaj subteni la kampanjon.

Ni kaptu oportunojn. Tiurilate eĉ la rezolucioj de UNESKO pri E-o donas bazon kaj gravecon por nia lingvo en internacia komunikado.

Alia laboro, kiun precipe niaj japanaj geamikoj povus fari, estas aldoni E-on al la lingvolistoj por la poŝtelefonoj. Kaj

ankaŭ kreon de taŭgaj aplikaĵoj, je kiuj troviĝos diversaj informoj pri la olimpiaj ludoj, la bezonataj informoj por la turistoj kiel la publikaj veturiloj, la hoteloj, la restoracioj kaj manĝaĵoj, prezento de vidindaj lokoj ktp.

Fine menciindas, ke similan ideon havis profesoro Saheb-Zamani, unu el gravaj pioniroj de E-o en Irano kaj nia granda instruisto, kiu sian vivon honeste kaj sindone dediĉis al Esperanto.

Amir Fekri (El Irana Esperantisto 19/2016)

## NOVA RETEJO DE LA E-MUZEO EN VIENO



Ni ĝoje atentigas vin pri la nova retejo de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Kolekto por Planlingvoj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/> Esperantomuzeo: <http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/> Pli mallongaj tekstoj, pli da bildoj kaj konciza strukturo zorgu, ke vi facile kaj rapide ricevu deziritajn

informojn, kiujn vi bezonas por viaj laboroj en la biblioteko aŭ por via vizito en la Esperantomuzeo.

Ĉi-kune mallonga superrigardo pri la plej gravaj ŝanĝoj:

1. La retejo estas plibonigita, por ke vi povu klare legi ĝin sur diversaj iloj kiel (poŝ)komputiloj, tabulkomputiloj kaj saĝtelefonoj.
2. Pro la nova menuo vi atingas pli facile la diĝitajn dokumentojn de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo – librojn, periodaĵojn, dokumentojn pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri la unua mondmilito.  
Libroj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/>  
Periodaĵoj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/periodaĵoj/>  
Universalaj Kongresoj de Esperanto (1905-1939): <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/universalaj-kongresoj-de-esperanto/>  
Unua mondmilito: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/unua-mondmilito-1914-1918/>
3. Sur la hejmpaĝo vi baldaŭ povos vidi interalie novaĵojn kiel novajn dokumentojn (ekzemple antaŭ- kaj postlasaĵojn en la Esperantomuzeo) kaj scienca blogo regule informas pri interesaj temoj rilate al Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko.  
Scienca blogo: <http://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/>

Ni kore invitas vin viziti nin, ĝuu la foliumadon!

Bernhard Tuider



**NOVAJ EBLOJ POR MAGISTRAJ STUDIOJ EN POZNANO**

**Nova eblo por magistras studoj en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (UAM) pri etnolingvistiko kun interlingvistika modulo**

La du-jaraj surlokaj studoj (en la Lingvistika Instituto, Fakultato de Moderna Filologio) estas ofertataj la unuan fojon por gestudentoj el diversaj landoj. Ili entenas studobjektojn pri:

- Lingvistiko, kulturo, antropologio,
- Internacia kaj interkultura komunikado,
- Planlingvoj kaj esperantologio,
- Daŭrigo de la lingvoj angla kaj esperanto, komenco de la pola.

La studoj okazos en Esperanto kaj la angla, finiĝos per diplomlaboraĵo kaj fina ekzameno. Ili validas sume 120 ECTS (poentojn).

Postuloj:

- baza (bakalaŭra) universitata diplomo,
- meza scio de Esperanto kaj la angla (B1 nivelo).

Studkotizo (por landoj ekster Eŭropa Unio): 2500 EUR / studjaro.

Poznano estas bone alirebla per trajno (meze inter Berlino kaj Varsovio) kaj aviadile, la loĝ-kaj manĝokostoj estas moderaj.

Kandidatoj por 2017-19 estas bonvenaj jam nun anonci sian deziron ([ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)), fina limdato: 15.08.2017. La studoj komenciĝos fine de septembro 2017.

Ilona Koutny

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de novembro 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Miguel Fernández, José Antonio del Barrio, Ilja Gnusarev, Julian Modest, Fetah Zvirac, Amir Fekri, Bernhard Tuidier, Ilon Koutny, Herman Deceuninck

Kontakto: [ztisljar@europa.eu](mailto:ztisljar@europa.eu)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

